Universala Esperanto-Asocio

**AKTIVULA MATURIGO**

Estrara Subteamo: MOVADO

*Estrara Komuniko EKO 2018-16 sendita el Budapeŝto, la 24an de junio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

# AMO en la Kongreso en Lisbono – bonvenon!

Unuafoje la AMO-programo venas al Universala Kongreso, kie ĝi ludos gravan rolon. Ĝis nun ni evitis organizi seminarion kadre de UK, pro multegaj aliaj konkurencaj devoj de la potencialaj gvidantoj. Ni jam pli frue kuraĝis organizi seminariojn en Kongresoj de ILEI kaj en la junularaj kongresoj, sed por ni UK estis 'ponto tro'.

Kial nun la ŝanĝita sinteno? Unue, ni festas jam nun la 50an seminarion, nur 52 monatojn depost la lanĉo de la programo en marto 2014. Due, la temo de la nuna seminario rilatas tre strikte al la nuna stato de nia Asocio.

## La temo: Kiel UEA transformu sin por logi kaj reteni membrojn?

Kiom ajn ni volus ŝanĝi la dependecon je membrokotizoj, ili persiste ludas ŝlosilan rolon en la enspezoj – kaj regule ne atingas la buĝetitajn sumojn. Jes, aktuala kaj gravega temo por nia Asocio. Jen subtemoj por diskuti:

1, Ĉefaj mesaĝoj kaj celgrupoj;
2. Rolo de junuloj kaj TEJO en membrovarbado;
3. Rolo de la landa kaj loka agado;
4. Rolo de revuoj kaj komunikiloj;
5. Rolo de seminarioj kaj gvidiloj;
6. Rekonceptado de la servoj de UEA;
7. Alternativoj al la dependeco de membrokotizoj.

Emfazendas, ke la seminario estos malferma al ĉiu kongresano, kiu volas kontribui aŭ aŭskulti. Sed ĝi estas aparte rekomendata al la komitatanoj de UEA, kiu havas la taskon aprobi la asocian buĝeton por 2019. Efektive, la du-taga seminario oficiale aperos ene de la sub-komitataj kunsidoj, kiuj kutime okazas tra la kongresa semajno.


Do, la partopreno de pluraj komitatanoj estas morale deviga. Anticipaj aliĝoj eblas, sed ne necesas (al la retadreso de la pretiganto de la EKO-komunikoj – vidu fine.

Laŭ la nuna stato de la kongresa programo, la seminario okazos ekde 14.00h tra du horoj en la kongresaj ĵaŭdo kaj vendredo.

Fontoj laŭ kiuj partoprenemuloj pretigu sin estas la artikolo de Stefan MacGill kaj Renato Corsetti, kiu aperis en la junia numero de revuo *Esperanto* (p. 130-131). Tiu numero de la revuo estas libere legebla aŭ elŝutebla de ĉiu membro de la Asocio post ensalutado ĉe:

https://uea.org/revuo


La junia numero prezentas ankaŭ la jarraporton de UEA, do estas pli libere alirebla ol kutime, kiel atestas la alta nombro de elŝutoj:




Komisiono starigita de la Komitato ricevis la taskon analizi la asociajn financojn; tion ĝi prezentis al la komitatanoj en februaro 2018. Tiu grava prepara dokumento (kune kun multaj pliaj) legeblas aŭ elŝuteblas por ĉiu ensalutinta membro de UEA ĉe:

https://uea.org/teko/komitato

Vi vidos bildon de la ekrano sur la sekva paĝo.




Plie, ni alkroĉas utilan dokumenton al la nuna komuniko, kiu skizas strategiojn pri donacvarbado. Ĝin verkis la siatempa prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin.

Bonvenon al nia seminario!

# Esperanto en franca poezia konkurso

Majofine kuniĝis la du ĵurioj (france kaj esperante) de la konkurso Poésie-en-liberté/Poezio-tut'libera 2018 en la franca Ministerio pri edukado. Ili estis akceptitaj de Dominique Pince-Salem, respondeculo en la Ministerio. Vidu la foton en la sekva paĝo de la E-ĵurio kune kun la reprezentantoj de la Ministerio.

Franclingve partoprenis 4000 junuloj inter 15 kaj 25 jaraĝaj, el 65 landoj. En la ĵurio kunsidis 15 junuloj kaj la prezidanto estis la poeto Etienne Orsini.

Unuafoje Esperanto estis akceptita kiel lingvo de tiu konkurso. Por la esperanta ĵurio kunsidis Jesper Jacobsen, Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero. Esperantlingve partoprenis 48 junuloj el 20 landoj, la plimulto inter 16 kaj 19 jaraĝaj. 25 studas en mezlernejo (liceo/gimnazio): 22 el Francio, 4 el Turkio, 3 el Britio, 3 el Venezuelo, ktp.


La nivelo de la lingvo estis tre diversa. Ŝajnas ke multaj eklernis esperanton por partopreni la konkurson; tio montras, ke tia konkurso povas esti alloga al la lingvo.

1-a premio : Ingrid Berglund, el Sundsvall, Svedio, por «La devoj de la vivo».

2-a premio : Elisa Estévez, el Tabio, Kolombio, por «Ni estos vortoj».

3-a premio : Eva Pechová, el Praha, Ĉeĥio, por «Senti la momenton».

La rezultoj estos oficiale anoncataj la 2-an de julio en Universitato La Sorbonne. En oktobro ĉiuj premiitaj poemoj estos eldonataj en libro. La 22-an de novembro okazos granda ceremonio en Parizo al kiu estos invititaj la gajnintoj.



Gilles Tabard

Vortoj: 595

=====================

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.